

[noto] fonto: "La Esperanta Budhano", n-ro 14, 2015 (B.E.2558)

OGONGE
Kantiko pri Universala Adorado
el la Longa Sutro de Sukhāvati Vyūhā

無量寿経・東方偈（往觀偈）

trad. **Elson Snow**, Usono
(korektita de Yamaguti Sin'iti)

En landoj en la orienta direkto
pilgrimantaj bodhisatvoj amasiĝas
kiel sableroj de la rivero Gango;
ili ĉiuj iras al Tathagato Amitabho.

En landoj okcidentaj, nordaj kaj sudaj,
supraj kaj subaj ankaŭ
bodhisatvoj loĝas;
ili ĉiuj iras al Tathagato Amitabho.

Ili ĉiuj portas ĉielflorojn
gemojn, aromajn incensojn,
senprezajn robojn,
kaj ofertas ilin al Tathagato Amitabho.

Ili ritme ludas liberan ĉielan muzikon,
kies sono harmonias,
akorde adorkantas kantojn,
kaj ofertas ilin al Tathagato Amitabho.

Tathagato Amitabho estas tiel laŭdata:
"Vi estas venkinto posedanta
profundajn saĝon, meriton kaj virton
per kio enirejo de dharmo estas malfermita.

"Vi lumigas la mondojn per la suno de kompato,
vi forpelas la nubojn de naskiĝo-kaj-morto."
Oni ĉirkaŭiras Lin tri fojojn kun kapo adorklinita
kaj tiel la sensupera adorato estas honorata.

La purlando estas glore kaj brile vidata
kaj pro tio bodhisatvoj volas ke
ilia lando estu tiel same konstruita
kaj tiel same iluminita.

Tiam Amitabho ridetas
kaj elbuŝigas lumojn verŝante
radiojn sur ĉiujn landojn
en ĉiuj dek direktoj.

Flamiĝantaj lumoj trifoje ĉirkaŭiras lian korpon
kaj eniras en la verton;
tia mirakla aspekto
ĝuigas ĉiujn homojn kaj diojn

Avalokiteŝvaro, la grandulo
ĝustigante sian veston demandas la Budhon,
"Kial vi tiel ridetas?
Mi volas koni vian intencon."

Tiam la voĉo de la Budho tondras
per ok tonoj tra la aero:
"Nun mi certigas vian budhiĝon.
Bone aŭskultu min.

El ĉiuj dek direktoj lertuloj venas;
mi scias iliajn voton kaj volon
purigi sian landon sekvante mian garantion.
Ili ĉiuj budhiĝos kaj atingos sian celon.

Konsciante, ke ĉiuj ekzistoj similas
al sonĝo, eĥo aŭ iluzio,
ili plenumos siajn votojn
kaj tiel establos siajn landojn.

Sciante, ke ekzistoj estas same
kiel fulmo kaj ombro,
ili profunde penetros la vojon kiel bodhisatvo
kaj budhiĝos kun meritoj plenigitaj.

Vidante, ke la eco de ĉiuj ekzistoj
estas ŝunjata, senenta, kaj senegoa,
ili nepre konstruos tian purlandon,
kian ili serĉis kun unuiĝinta koro."

Budhoj instigas bodhisatvojn
observi la Budhon Amtabhon en la lando de trankvilo.
Aŭskultu la dharmon, tenu ĝin kun ĝojo,
kaj senprokraste aliru al la pura loko.

Kiam vi alvenos al la ornamita lando,
diaj potencoj estas tuj akireblaj.
Sub la gvido de la Budho Amitabho
vi tuj plenumos iluminiĝon.

Per la fundamanta voto de tiu ĉi Budho
ĉiuj, kiuj aŭdas lian nomon,
kaj aspiras finan naskiĝon en lia lando,
atingos la rangon de ne-retroiro.

Bodhisatvoj ekigas superajn votojn,
ke ilia lando estu tiel same kiel tiu de la Budho;
ili volas savi ĉiujn viv-estaĵojn,
tiel ke ilia famo disvastiĝos tra ĉiuj dek direktoj.

Bodhisatvoj servas al milionoj da Tathagatoj
kaj flugas al diversaj budho-landoj;
ili kun respekto kaj kun ĝojo iras al tiuj landoj,
kaj revenas al la feliĉoplena lando de Amitabho.

Se al homoj mankas radiko de bonoj,
ili ne povas aŭskulti tiun ĉi sutron.
Tiuj, kiuj pure tenadis preceptaron,
nun povas aŭskulti la ĝustan dharmon.

Renkontinte iam antaŭe la adoraton de la mondo
oni povas kredi tion ĉi.
Li kun respekto servas al li
kaj ĝojas kvazaŭ dancante.

Tiuj, kiuj estas arogantaj kaj maldiligentaj,
ne povas facile kredi tiun ĉi dharmon.
Sed pro renkontiĝo kun la Budho en la pasinta vivo
ili ĝoje aŭskultas tiun ĉi instruon.

Nek ŝravakoj (*Śrāvaka*) nek bodhisatvoj
povas tuŝi lian internan sanktan koron,
same kiel denaska blindulo
ne povas konduki homojn sur stratoj.

La oceano de la tathagata saĝo
estas senlime profunda kaj vasta.
Ĝin ne povas sondi la saĝuloj de la du veturiloj;
la Budho sola klarigas.

Eĉ se ĉiuj homoj
plenaj de virtoj atingus la vojon,
per la pura saĝo konus la realecon de senento,
kaj kontemplas budhan saĝon dum miliardoj da kalpoj,

kaj eĉ se ili provus ekspliki per la tuta forto,
per la strebado dum la tuta vivo, ili ne scius,
ke la budha saĝo estas senlima.
Tiel ili alvenas al la pura stato.

Estas malfacile akiri homan vivon;
ankaŭ malfacile estas renkonti la aperon de Budho.
Homoj tre malofte gajnas kredon kaj saĝon.
Se vi havas okazon, sincere strebu al la dharmo.

Se vi aŭskultas la dharmon kaj tenas ĝin en memoro,
kaj se vi vidas, respektas, gajnas kaj ĝojas la dharmon,
vi estas mia bona amiko.
Tial vi devas ekvoli la dharmon.

Eĉ se la tuta mondo estas plena de fajro,
trapasu ĝin postulante la dharmon.
Tiam vi nepre atingos la finon de la budha vojo
kaj transiros la fluon de naskiĝo-kaj-morto.